

John Ellerton,
Forpasis tiu tag', Sinjoro

tradukita de Frieder Weigold

1. Forpasis tiu tag', Sinjoro,
Kaj profundiĝas la senlum'.
Vi gardis nin de ajn doloro.
Nin gardu ankaŭ dum noktum'!

2. Ni rotacias en la tagon.
En nokta paco dormas ni.
Kaj portas lumon trans la maro
La suno, kie brilas ĝi.

3. Senĉese kiel la mateno
Briladas super tera rond',
Eksonas laŭdo pro la beno
Al ĉiu sur la vasta mond'.

4. La suno, kiu ĵus subiris,
Ja brilas en plu fora land'!
La gloron, kiun ni admiris,
Anoncas plu preĝada kant'.

5. Pereas regnoj. Tiel estu!
Kaj sole staras via tron',
Ke sole via regno restu
Je fina tag' sub unu kron'.

...

John Ellerton,
Finiĝas nun alia tago

tradukita de William John Downes

1. Finiĝas nun alia tago,
jam venis la vespera hor'.
Kunvenis ni por adorado
plaĉanta al la Di-Sinjur'

2. Ni dankas Vin, Savanto nia,
ke sur la tuta mond-teren'
la sankta eklezio Via
staradas firme ĉe posten'.

3. Ruliĝas tero, brilas lumo
de ne-ĉesanta maten-glor'.
Leviĝas laŭdo, preĝ-parfumo
konstante, kiel dolĉ-odor'.

4. Ekdormas ni post sun-subiro;
gefratoj en la okcident'
vekiĝas kun novtag-aspiro
Vin glori per viv-elokvent'.

5. Formortos mondaj imperioj,
sed Via regno kreskos plu.
Al Vi sin cedos dinastioj,
Venkinto estos vi, Jesu'!

...

*Traduko de la Angla poemo “The day Thou gavest, Lord, is ended” de JOHN EL-LERTON (*1826-12-16 – †1893-06-15) en Esperanton de Frieder Weigold.*

Arg-130-932 (2008-11-08 14:22:49)

Mi, Manfred Retzlaff, ricevis tiun ĉi tradukon de la kanto en 2008-11-06 de sinjoro Frieder Weigold (Birkenstr. 12, D-82178 Puchheim, Germanio), kiu mem faris la tradukon en Esperanto. S-ano Weigold verkis tiun tradukon - kiel li diris al mi - laŭ la germanigo farita de s-ro Raymund Weber. Tiu germanigo estas trovebla en la germana katolika kant-libro “Gotteslob” (= Laŭdo de Dio), n-ro 981, pli nova eldono. La teksto kun la muzik-notoj troveblas ankaŭ en la retejo http://www.documentacatholicaomnia.u/01p/2006-09-10,_SS_Benedictus_XVI,_Ves_er_in_der_Kathedrale_in_Muenchen,_GE.pdf.

*Traduko de la Angla poemo “The day Thou gavest, Lord, is ended” de JOHN EL-LERTON (*1826-12-16 – †1893-06-15) en Esperanton de WILLIAM JOHN DOWNES (*1892 – †1987).*

Arg-130-302 (2004-02-04 11:38:05)

Tiu ĉi traduko aperis en la Ekumena Diserva Libro “Adoru”, eldonita en 2001 de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE) kaj Kristana Esperanta Esperantoligo (KELI), kanto numero 153.